

BRAZILA ESPERANTISTO

63-A JARO

MAJO-AUGUSTO 1969

N.º 662-665



Ismael Gomes Braga

Vicprezidanto de B. E. L.

★ 14-7-1891 — † 18-1-1969

MAJO-AUGUSTO 1969

63-a Jaro

N.º 662-665

BRAZILA ESPERANTISTO

("O Esperantista Brasileiro")

Oficiala organo de

BRAZILA ESPERANTO-LIGO

Societo de publika utileco, laŭ registara
dekreto N. 4356, 26 Oktobro 1921

Direktoro :

A. CAETANO COUTINHO

Respondeca redaktoro (redactor principal) :

D-ro CARLOS DOMINGUES

Administracio kaj Redakcio :

Praça da República, 54, 2.º

Telefone : 42-4357

Sidejo de la Brazila Societo de Geografio
RIO DE JANEIRO — BRAZILIO

Senpaga por anoj de **B. E. L.**

Eksterlande : 18 steloj aŭ 15

respondkuponoj

QUOTA ANUAL DE ADESAO A LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO

(De acordo com os Estatutos todos os
membros são automaticamente filiados à
organização mundial)

Membro simples : recebe a carteira de sócio, os cupões de serviço e o "Brazila Esperantisto"	10,00
Membro com direito ao Anuário : recebe o mesmo que o anteceden- te e mais o Anuário do movimen- to esperantista	30,00
Membro Assinante : recebe o mesmo que o antecedente e mais a revista "Esperanto"	45,00
Membro Mantenedor: recebe o mes- mo que o Membro Assinante	70,00
Patrono : recebe o mesmo que o Membro Assi- nante e paga 10 vèzes a quota dèste.	
Membro Vitalício : recebe o mesmo que o Membro Assinante e paga 20 vèzes a quota dèste.	

Tôdas as importâncias devem ser remetidas
em cheque pagável no Rio de Janeiro à

LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO

PRAÇA DA REPÚBLICA, 54, 2.º

Rio de Janeiro, GB

LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO

BALANCETE REFERENTE A 1968

R E C E I T A

	NCR\$
Saldo de 1967	1,24
Assinaturas	529,89
Comissões	494,37
Contribuições	9.550,00
Cursos	1.699,00
Despesas de sede (B.K.E.)	300,00
Diversas receitas	2.098,01
Donativos	33,00
Revista (B.K.E.)	100,00
Serviço de livros	6.270,96
	21.076,47

D E S P E S A

	NCR\$
Assinaturas	273,78
Biblioteca	304,00
Comissões	656,70
Cursos	80,80
Despesas de sede	2.733,19

Franquia	308,71
Diversas despesas	656,07
Informação	492,70
Material de expediente	279,99
Quotas U.E.A.	5.035,25
Revista	1.631,00
Serviço de livros	6.833,33
Serviço de secretaria	1.710,00
Saldo para 1969	80,95
	21.076,47

Rio de Janeiro, 2 de janeiro de 1969

Irani Baggi de Araújo
Tesoureira

A N O N C E T O

Por kompletigi mian kolekton mi
bezonas jenajn numerojn de *Brazila Es-
perantisto*: 1907, n.º 4 kaj 5; 1908, n-ro
de septembro; Oktobro 1933, februaro
1934 (unu sola numero). Se iu volas ven-
di ilin, skribu tuj al: Sro. R. Molera-Sta.
Joaquina, 13-Moyá (Barcelona)-Hispa-
nujo.

RELATÓRIO DA DIRETORIA

REFERENTE AO ANO DE 1968

Senhores Delegados e Membros,

De conformdade com o disposto no Art. 15 dos nossos Estatutos, cumprio o dever de apresentar-vos o Relatório da Diretoria e o Balanço da Tesouraria, referentes ao ano próximo findo de 1968.

1. DIRETORIA — Durante o exercício continuou em função a Diretoria eleita em 18 de dezembro de 1965 e cuja composição é a seguinte: Presidente — Prof. Dr. Carlos Domingues; Vice-Presidente — Sr. Ismael Gomes Braga; Secretário Geral — Sr. Luiz Alberto Martins; Primeiro-Secretário — Eng. Floriano Pessoa; Segundo-Secretário — Sr. Joel Vasques Manso; e Tesoureira — D. Irani Baggi de Araújo.

2. SECRETARIA — A correspondência tem aumentado de ano para ano; foram recebidas cerca de 1700 cartas e expedidas aproximadamente 3.000. Esse vultoso trabalho foi desempenhado pelos três secretários com a coadjuvação de D. Irani Baggi de Araújo, 25 Coronel Jorge Campos de Oliveira e também do Presidente.

3. TESOURARIA — A tesouraria vos expõe o Balanço anual. A receita de 1968 importou em NCr\$ 21.076,47 e a despesa em NCr\$ 20.995,52. Todos os pagamentos estão em ordem e nosso crédito no exterior continua grande e firme.

4. QUADRO SOCIAL — Em 1968 estavam inscritos no Movimento 466 esperantistas do Brasil, assim distribuídos: 206 Membros Simples e 260 Membros Individuais. No cômputo geral o Brasil está no 17.º lugar entre 84 países. Essa posição pode e deve ser melhorada.

5. GRUPOS — No Anuário de 1965 figuravam 41 grupos brasileiros. No ano findo 29 grupos deram a sua adesão ao Movimento. O "Brazila Esperantisto", como vem fazendo já há alguns anos,

publicará os seus nomes e bem assim a estatística dos seus membros. 4 novos grupos se fundaram: Associação Esperantista de Sergipe, Aracajú; Patos Esperanto-Societo, Patos de Minas, MG; Esperanto-Klubo de Rio Preto, São José do Rio Preto, SP; e Esperantista Societo de Bagé, Bagé, RS.

6. UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO — As nossas mútuas relações foram cordiais e eficazes. A B.E.L. continuou a ser uma das mais prestigiosas ligas nacionais. Dois membros do "Komitato" representam a nossa organização, a saber, o General Geraldo Pádua e o Prof. Dr. Carlos Domingues.

7. DELEGADOS — A B.E.L. insistentemente tem procurado aumentar a rede de Delegados, convidando a fazer parte dela todos os esperantistas ativos. Em 1968 alcançamos o 6.º lugar entre 63 países contando 185 Delegados das três categorias.

8. 53.º CONGRESSO UNIVERSAL DE ESPERANTO — No Congresso, realizado em Madrid, a Liga foi representada pelo Sr. Francisco de Souza Almada, de Santos. Como de costume, pedimos ao Ministério das Relações Exteriores a nomeação de um diplomata para representar nosso país, pedido que o Ministério não pôde atender por não haver funcionário disponível na cidade do Congresso. Todavia, o Ministério obteve e remeteu à Liga a documentação relativa aos trabalhos.

9. 20.º CONGRESSO BRASILEIRO DE ESPERANTO — Os nossos amigos de Uberlândia, a quem incumbe preparar o Congresso, ainda não se manifestaram sobre a época em que podem realizá-lo. Por outro lado, os nossos Estatutos prevêm que os Congressos não devem ser demasiado frequentes.

10. CURSOS — Funcionaram regularmente os cursos por correspondência, mantidos pela B.E.L. em que se ins-

creveram 51 alunos, sendo 30 no Curso Elementar, 20 no Superior e 1 no Magistral. Lecionaram os seguintes professores: no Curso Elementar, Sr. Joel Vasques Manso; no Superior, Eng. Floriano Pessoa; no Magistral, Prof. Carlos Domingues. Alguns grupos organizaram cursos, do que deu notícia a secção "Brazila Kroniko" no nosso órgão oficial. Na quase totalidade desses cursos, como também no Curso Elementar da B.E.L., foi adotado o livro de Couto Fernandes e Mota Mendes que continua a demonstrar-se obra altamente didática. A conservação da pureza da língua foi a constante das atividades de ensino da B.E.L. que nunca perde de vista as lições do "Fundamento" e as decisões da Academia de Esperanto.

11. DIPLOMAS — A B.E.L. distribuiu em 1968 76 diplomas Elementares, 2 Superiores e 3 Magistrais, no total de 81. 7 Grupos concederam diplomas: Clube Esperantista Juiz de Fora, Patos Esperanto-Societo, Brazila Klubo Esperanto, Ribeirão Preto Esperanto-Klubo, Esperanto-Societo de Rio Grande, Goiânia Esperanto-Klubo e Associação Brasileira de Esperanto. Cumpre registrar, neste particular, o trabalho desenvolvido pela Federação Espirita Brasileira, como também pelos Srs. Irmão Macário Piastrella, de Araguaína, GO, e Gersi A. Bays, de Chapecó, SC. Repetidamente mostramos aos grupos a necessidade de conferir diplomas visto que este documento obediente às normas da Academia de Esperanto tem valor internacional e serve eficazmente de conservar a unidade da língua. Demais, em nosso país, o Diploma de Esperanto vai tendo aceitação oficial, que naturalmente tende a ampliar-se.

12. REVISTA — Não obstante as dificuldades para qualquer publicação, o Brazila Esperantisto prossegue na sua carreira, iniciada em 1907, figurando entre os seis mais antigos periódicos esperantistas ainda em circulação. Para mostrar o apreço em que é tido basta citar que conta vários assinantes no exterior e que as suas coleções completas são por vezes adquiridas. É diretor da revista o Sr. Antonio Caetano Coutinho, que teve a cooperação do Dr. Luiz Alberto Martins. Deram colaboração de diferente natureza D. Irani Baggi de Araújo, Cel. Jorge Campos de

Oliveira, Eng. Floriano Pessoa, Sr. Joel Vasques Manso, Sr. Ismael Gomes Braga e Sr. Henerik Kocher. Redator responsável é o presidente da Liga.

13. ARQUIVO — Possuímos um precioso arquivo, que pela sua riqueza e variedade, merece ser visto. O ARQUIVO DE RECORTES DE JORNAIS que vem do século passado, é uma história viva do Esperanto do Brasil; a sua atualização é feita por DD. Marcelina de Azevedo Carneiro e Irani Baggi de Araújo. O ARQUIVO DE FOTOGRAFIAS está confiado a DD. Regina de Barros Pessoa e Irani Baggi de Araújo. O Prof. Henerik Kocher incumbem-se do ARQUIVO DE REVISTAS. A nossa funcionária D. Luisa Pereira Lemos tem a seu cargo o ARQUIVO GERAL.

14. BIBLIOTECA — Com cerca de 3.200 volumes devidamente catalogados, a nossa biblioteca é a mais rica coleção de livros de Esperanto do Continente Americano e foi muito procurada por leitores e pesquisadores. Além dos livros adquiridos por compra ou oferta ela incorpora as obras que são remetidas à Liga para crítica do "Brazila Esperantisto". Está confiada ao Cel. Jorge Campos de Oliveira.

15. SERVIÇO DE LIVROS — A nossa provisão de livros contém obras de quase todos os editores, obtidos por compra ou permuta. O catálogo impresso indica algumas centenas de obras. No ano findo distribuimos livros no valor de NCr\$ 6.270,96. Não sendo a B.E.L. uma entidade comercial, a importação de livros apresenta muitas e grandes dificuldades que, todavia, arrostamos por sentir que a difusão do Esperanto depende da existência de livros colocados ao alcance dos interessados. O estoque foi grandemente enriquecido no ano findo.

16. EDIÇÕES — Estão prontos os seguintes originais: *Canaã*, de Graça Aranha, traduzido por A. Caetano Coutinho; *Inocência*, de Taunay, em tradução de Geraldo Pádua; *Iracema*, de Alencar traduzido por Benedito Silva; *Poesias Esperantistas*, de Melo e Souza. Entre as obras didáticas mencionam-se o Dicionário Português-Esperanto, 2.^a Edição, de Couto Fernandes, Carlos Domingues e Porto Carreiro Neto, e o Vo-

cabulário Esperanto-Português e Português-Esperanto, de Carlos Domingues. Os dois últimos, a mais nova edição portuguesa da Chave do Esperanto e a Gramática Sinóptica do Esperanto de Mário Ritter Nunes, estão sendo objeto de entendimento com o Instituto Brasileiro de Geografia e Estatística. Cogitamos também de um Guia de Conversação. Como bem avalia, todo esse programa pressupõe o emprego de enormes somas mas essa dificuldade pode somente adiar a execução.

17. **ESPERANTO NAS ESCOLAS** — A Universidade Federal do Ceará continua a manter o Curso de Esperanto, criado em 1965. Estimulados decerto pela Decisão favorável ao Esperanto, do Conselho Federal de Educação, vários ginásios anunciaram ter aberto cursos da Língua Internacional. Infelizmente não nos foi possível coligir dados completos e atuais sobre o funcionamento desses cursos. Há evidente necessidade de criar-se na B.E.L. uma seção especialmente dedicada a acompanhar a marcha do Esperanto neste importante campo.

18. **IMPRENSA** — Distribuimos a periódicos do Rio de Janeiro e de muitas outras cidades, como temos feito durante anos, regular número de comunicados que foram em geral bem acolhidos. Os recortes respectivos são arquivados, quando nos chegam às mãos.

19. **RÁDIO E TELEVISÃO** — O Esperanto voltou a ser irradiado pela Rádio Ministério da Educação e Cultura. Num programa de informações gerais o Sr. Joel Vasques Manso escreve agora um noticiário de alguns minutos. Existem também programas nas estações de Murtiba, BA; Uberlândia, MG; e Guarulhos, SP; segundo informações dos delegados locais. Estações de televisão do Rio de Janeiro e principalmente de São Paulo apresentaram programas com Esperanto.

20. **ACADEMIA DE ESPERANTO** — O único representante da Língua Portuguesa na Academia é o Prof. Dr. Carlos Domingues. Dos 45 membros da Academia 37 se acham na Europa, 5 na Ásia e 3 na América. Os membros residentes na América têm domicílio nos Estados Unidos, no Uruguai e no Brasil, tendo os dois primeiros o ale-

mão como língua materna e sendo o presidente da Liga representante nativo.

21. **INFORMAÇÃO** — É esta uma das seções mais movimentadas da B.E.L.. Diariamente recebemos pedidos de informação a que respondemos, em geral, com material padronizado, folhas volantes, catálogos, etc. O "Brazila Esperantisto" é largamente usado para informar sobre o movimento. Mantemos, em conexão com a U.E.A., o Serviço de Informações que colige e fornece dados para a estatística mundial. Já nos referimos aos comunicados distribuídos à Imprensa, convindo ainda mencionar que somos não raro procurados pelos próprios jornais para prestar informações.

22. **LEIS** — As leis que criam o ensino do Esperanto nas escolas de grau médio de São Paulo e da Guanabara por motivos óbvios ainda não tiveram execução. Esses textos precisam ser regulamentados para a criação de cargos, a nomeação de professores e a determinação de verbas. O esperantista deve ter sempre em mente a lição de Zamenhof, que doutrina serem indispensáveis "l'espero, l'obstino kaj la pacienco".

23. **RUAS** — A lista de ruas brasileiras com o nome ESPERANTO ou ZAMENHOF foi em 1968 acrescida de mais um logradouro: a Rua Zamenhof em Rio Grande, RS, conforme decreto assinado pelo prefeito da cidade. Neste particular ocupamos no mundo o segundo lugar, logo após a França.

24. **SUBVENÇÃO** — O Orçamento Estadual para 1968 consignou a verba de NCr\$ 1.000,00 como subvenção à B.E.L.. Apesar de nos termos habilitados em tempo oportuno, até agora não nos foi paga a subvenção, mas continuamos a diligenciar. Para o ano corrente consta do Orçamento Estadual a subvenção de NCr\$ 2.000,00. Oportunamente solicitaremos auxílio ao Conselho Federal de Cultural para edição de livros.

25. **MORTOS** — Em 1968 desapareceram dois dedicados samideanos, a quem devemos notáveis serviços: José Carlos de Macedo Soares muito nos auxiliou como presidente do Instituto Brasileiro de Geografia e Estatística e



Strato L. L. Zamenhof en Rio Grande, RS.

G E E D Z I Ĝ O

Nia samideano S-ro Antonio Lopes de Oliveira Filho edziĝis kun F-ino Edméa Silveira Luz la 25-an de Januaro en Alem Paraíba, Minas Gerais. Nian sinceran gratulon.

deu grande brilho ao 10.^o Congresso Brasileiro de Esperanto, que presidiu; Luís de Azeredo Coutinho era membro vitalício do Movimento, foi membro da Comissão Executiva da U.E.A., organizou o 11.^o Congresso Brasileiro de Esperanto, representou o Brasil no Congresso Universal de Varsóvia e tinha diplomas dos 3 graus. Foram dois assinalados amigos do Esperanto. Renovamos aqui os nossos sentimentos já manifestados às famílias.

Concluindo, desejo agradecer a desinteressada e leal colaboração que recebi dos prezados consócios, especialmente daqueles que foram mencionados neste relatório. Vários fatos aqui citados já foram descritos com minúcia no "Brazila Esperantisto". O relatório é naturalmente sintético, mas fico à disposição de todos vós, como é do meu dever, para qualquer esclarecimento que julgardes necessário.

Rio de Janeiro, 26 de abril de 1969

Carlos Domingues
Presidente

NOVA STRATO

Rio Grande, RS

En la 15-a de Decembro de la pasinta jaro okazis en Rio Grande, Rio Grande do Sul, la inaŭguro de la Strato "Dr. L. L. Zamenhof" en la kvartalo Habicop, Vila Fraternidade. La soleno estis malfermita de S-ro Mario Centro, direktoro de la Departamento de Planado kaj Urbanismo, kiu, en nomo de la urbestro, oferis la straton reliefigante la valoron de la Internacia Lingvo.

P-ro Ernani Corrêa, prezidanto de E. Societo de Porto Alegre, malkovris la tabulon, kaj D-ro M. Belmonte de Abreu, oficiala oratoro, omaĝis la kreinton de E-o kaj salutis urbon Rio Grande, la urbestron kaj la urbkonsilantojn proponintajn la nomon de la strato. Parolis ankaŭ la konsulo de Portugalujo kaj, en E-o, F-ino Ione Franco Nunes.

La Esp-istaj Societoj de Porto Alegre kaj de Rio Grande ĉeestis la solenon, la unua per granda delegacio, kaj la dua per la tuta estraro, prezidita de S-ro Paulo Caruso. Estis reprezentitaj lokaj radistacio, biblioteko, lernejoj kaj asocioj.

NEKROLOGO

ISMAEL GOMES BRAGA

Ismael Gomes Braga, nia vicprezidanto kaj mondkonata esperantis-to, mortis en Rio de Janeiro la 18-an de Januaro post longa malsano, kiu tamen ne malhelpis lin labori por nia afero. Tiun malgojigan anoncon ni faras al niaj legantoj kun la plej sincera kaj profunda bedaŭro.

El interesa letero, kiun li skribis al la Prezidanto de B.E.L. en la 25-a de Marto 1950 kun informoj por sia estonta nekrologo, ni trovas kelkan materialon por ĉi tiu artikolo.

Li naskiĝis en la bieneto Bragui-nha, de lia patra avo, en la loko Córrego Alegre, proksime de urbo Ubá en Minas Gerais la 14-an de Julio 1891.

Gis 14 jaroj, nur kun tre nekompleta unuagrada kurso, li laboris en la terkulturo. Poste li fariĝis komercifcisto kaj de tiam plu laboris en la komerco. Li estis aŭtodidakto, ekkonis Esperanton en 1907 per broŝureto donacita de lia amiko João Ernesto, sed nur en 1910 kaj 1911 sufiĉe bone lernis la lingvon. Fakte en 1910 li faris kurson per korespondado ĉe B.E.L. sub la gvido de nia karmemora D-ro Alberto Couto Fernandes, kiu miris pro la rapideco, kun kiu la lernanto progresis.

En 1912 li fondis propagandan societon sub la nomo Esperantista Grupo-Junularo, kies prezidanto estis D-ro Antero Barroso kaj kasisto nia veterano el São Paulo S-ro Alcindo Brito, ambaŭ liaj lernintoj en Teixeira. Honora prezidanto estis D-ro Alberto Couto Fernandes kaj li mem estis la sekretario.

En 1918 li edziĝis en Saúde (hodiaŭ Dom Silvério) kun unu el siaj lernantinoj, F-ino Maria José Rolla; la tuta korespondado kun la fianĉino estis farita en Esperanto. Du ja-

rojn poste li translokiĝis al Rio de Janeiro. Li nomis sian solan filon Lauro Zamenhof omaĝe al nia Majstro.

Kiel jurnalis-to Ismael Braga hahispana, angla kaj franca li verkis kis artikolojn por multaj esperantaj gazetoj gravaj kaj malgravaj; speciale li estis kunlaboranto de *Esperanto*, *Oomoto*, *Heroldo de Esperanto*, *La Praktiko* kaj *Brazila Esperantisto*. Por ĉi tiu lasta li estis recenzisto kaj prezentis kaj komentariis multajn librojn.

Ankaŭ en la lingvoj portugala, hispana, angla kaj franca li verkis doktrinajn artikolojn por pluraj gazetoj spiritismaj kaj ne spiritismaj.

Li lernis E-on per *Gramática da Língua Esperanto* de Alberto Alvares kaj Leonel Gonzaga, eldonita en 1906 kaj kiu estis dum jaroj vaste uzata por la instruado. En 1910 li fariĝis membro de B.E.L. kun la matrikulo 13.

Kiam li ricevis pli grandan salajron, li komencis aĉeti Esperantajn librojn precipe en Germanujo. Ĉe la eksplodo de la 1-a Mondmilito li havis en tiu lando 200 korespondantojn akiritajn dank'al anoncoj, kiujn li aperigis en *Germanan Esperantiston*.

Poligloto, li skribis kaj flue parolis la lingvojn anglan, germanan, francan, italan, hispanan kaj sciis ankaŭ latinan, hebrean, araban, rusan, nederlandan kaj grekan. En sia naskiĝa urbo li instruis la francan. Li amis deklami parkere en la originalo tutajn pecojn de ĉefverkoj kiaj *Dia Komedio*, teatraĵoj de Shakespeare, poeziaĵoj de Ovido, Virgilo, Homero kaj de aliaj grandaj antikvaj verkistoj. Tuj post lia translokiĝo al Rio de Janeiro, kaj por ekzerci sian konon, li vizitadis, en la societo de D-ro Carlos Domingues, la templojn de diversaj religioj inkluzive de Kris-

tana Scienco, kie oni predikis kaj preĝis en fremda lingvo.

Por perlabori la vivon li lernis kontosciencon per korespondado ĉe usona lernejo kaj post perfektigo en Komerca Instituto li ricevis diplomon. En nokta lernejo li fariĝis stenografiisto.

Kiel li mem iam deklaris, li estis komercoficisto la tutan vivon, sed sen ia inklino por la komerco. Lia vera destino en la vivo estus tute intelekta kaj kurioze pro nepenetrablea mistero, troviĝis en lia vojo la plej teruraj baroj al lia intelekta preparado. Li disvolvis grandegajn energiojn por venki la malfacilaĵojn kaj poste li demandis sin mem: "Se mi estus pasiginta la junaĝon en kolegio, kun bonaj instruistoj, ĉu mi estus farinta, kion mi faris? Aŭ ĉu mi estus nur fierulo kompatinde ravita de si mem?"

Tamen estas necese aldoni, ke en diversaj firmoj, kie li laboris, li ĉiam plenumis gravajn oficojn pro siaj notindaj kapablo kaj sindono.

En la jaroj 1933 kaj 1934 Ismael Braga disvolvis eksterordinaran aktivecon por E-o: li aperigis afiŝojn en movplenajn publikajn lokojn kaj en tramveturilojn, li publikigis anoncojn en ĵurnalojn, li faris kursojn kaj paroladojn kaj super ĉio li verkis lecionojn, kiujn li disdonis al dekoj da ĵurnaloj en la tuta lando. Tiuj lecionoj estis la embrio de *Esperanto Sem Mestre*, kies primitiva originalo estas nun en la arkivo de B.E.L..

Ismael Braga demandis, ĉu de tiaj pergazetaj kursoj rezultis esperantistoj, kaj li mem citis la fervorajn samideanojn: Mário Matos Quinaud, Constantino de Carvalho, Albina de Morais, Sebastião Almeida.

Konscia pri la graveco de la libro por nia Movado, Ismael Braga kune kun D-ro Carlos Domingues en 1922 kreis libroservon, por kiu ili importis multajn librojn el Eŭropo kaj

metis ilin konsigne en 5 grandajn librejojn de Rio de Janeiro por disvendo. La afero daŭris kelkajn jarojn kaj funkciis sufiĉe bone.

En 1937 li entreprenis la eldonadon de libroj, kaj ĉe "Irmãos Pongetti" presigis jenajn librojn: *Essência e Futuro da Idéia da Lingua Internacional* (traduko); *Esperanto Sem Mestre* 1-a eldono, *Vocabulário Esperanto-Português* de Couto Fernandes, *Esperanto Livros e Discos* kaj *Veterano*.

En tiu tempo, per ĝia Prezidanto, D-ro Guillon Ribeiro, li sukcesis pli interesiĝi por Esperanto Brazilan Spiritisman Federacion, kiu cetere ekde 20 jaroj apogis nian aferon kaj havis la kunlaboron de niaj samideanoj José Machado Tosta kaj Alcindo Terra.

Sekve, en 1937 estis kreita ĉe la Federacio la Departamento de Esperanto, kiun Ismael Braga direktis ĝis sia morto. En tiu posteno li povis reveni al sia kara ideo pri libroj. La librejo, kun granda stoko, importis kaj vendis gravajn kaj malgravajn verkojn en sia E-fako. Venis novaj eldonoj: *Essência e Futuro da Idéia de Lingua Internacional* (originalo kaj traduko), *Esperantismo, Primeiro Manual de Esperanto, Metodo de Esperanto, Esperanto-Modelo, Guia de Conversação Português-Esperanto, Monumento de Carlo Bourlet, La Evangelio laŭ Spiritismo, Manual de Esperanto* (kun J. Scolnic), *Evangelho Segundo São João, Dicionário E.-Português, Preglíbrio por Spiritistoj, La Libro de la Mediumoj* (kun Porto Carreiro Neto), *Kio Estas Spiritismo* (kun P. Carreiro Neto), *Vida Idéias, Lógica e Obras de Zamenhof*.

De aliaj eldonistoj ni kalkulas 9 librojn inter kiuj *Curso Prático de Esperanto* (The Esperanto Publishing Co. Ltd.), *Esperanto A Lingua In-*

ternacional Viva (I.B.G.E.), Zamenhof (Nia Stelo, Portugalujo), Sabe Ler e Escrever?

Rilate al *Esperanto Sem Mestre* Ismael klarigis, ke li petis de F. V. Lorenz konsenton, por ke la libro ekde la 2-a eld. aperu sub la nomo de tiu lasta. Li ankaŭ diris, ke por tiu eldono kaj la sekvantaj li havis la kunlaboron de Porto Carreiro Neto, Pastro Nogueira Machado kaj Carlos Domingues.

La apogo de Brazila Spiritisma Federacio daŭris sub la prezido de S-ro A. Wantuil de Freitas, al kiu nia afero ŝuldas bonajn servojn.

Reformador dum pli ol 30 jaroj aperigis centojn da artikoloj pri aŭ en E-o. La Departamento de E-o helpis ankaŭ al la disvastigo de E-o per la eldono de verkoj de Porto Carreiro Neto, Jozeto Joels, Couto Fernandes kaj Carlos Domingues.

Dank'al la prestiĝo de Ismael Braga en la spiritismaj rondoj, li povis sincere kaj kun vero aserti, ke nur en Brazilo ekzistas tiu situacio, ke Esperanto estas objekto de propagando ĉe la spiritismaj grupoj.

Ismael kunlaboris en la farado de verkoj de aliaj kaj helpis anonime en la revizio de multnombraj verkoj. En la portugala lingvo li verkis la librojn *Sombras de Borboletas kaj Elos Doutrinários*, kiu traktas spiritismajn temojn.

En la Esperanto-Movado li ofte funkciis. Dum jaroj li estis kasisto de Brazila Klubo Esperanto; li estis elektita vicprezidanto de B.E.L. en 1946 kaj reelektita por 5 kvarjaraj periodoj; li prezidis la 13-an Brazilan Kongreson de E-o en Recife en 1952 kaj reprezentis B.E.L. ĉe la 4-a Argentina Kong. de E-o en Buenos Aires. En U.E.A. li estis Fakdelegito por Librokomerco.

Verkante multon, li uzis plurajn pseŭdonimojn: M. Souza Martins,

Lincóia Araucano, Antônio Túlio (aŭ A.T.), Cristiano Agarido (aŭ C.A.), Lino Teles (aŭ L.T.), Lauro Gomes, Ismar Brando, Israel Gomes ktp.

La stilo de Ismael Braga estas simpla, klara, glata, tiel en E-o, kiel en la portugala lingvo. Lia parolado ĉe la tombo de Couto Fernandes estas modelo pri sento kaj formo.

Lia nomo aperas en la fama *Enciklopedio de Esperanto* eldonita en Budapeŝto en 1933 kaj tie estas registrite, ke al li oni ŝuldas konstantan diligentan propagandon de E-o en la spiritisma medio.

Liaj religiaj konvinkoj neniam malhelpis, ke li havas bonajn amikojn en aliaj rondoj kie ekzemple ĉe la katolikaj pastroj ĉar liaj sentoj estis vere esperantistaj.

Sesdek jarojn Ismael Gomes Braga laboradis diversmaniere kaj senĉese por nia idealo. Kiel en ĉiu homa vivo li povas kelkfoje esti erarinta, kion li mem sincere kaj superece agnoskis. Sed entute lia agado estis fruktodona kaj espereble daŭra. Lia nomo ne malaperos el la historio de Esperanto en Brazilo kaj eĉ alilande. Ĉiuj esperantistoj rekonas kaj dankas lian longan aktivecon.

La enterigo de Ismael Braga okazis en Tombejo São João Baptista la saman tagon de lia morto. Ĉeestis multnombraj amikoj kaj samideanoj. La Prezidanto de B.E.L. kal la 1-a Sekretario, Inĝeniero Floriano Pessoa, reprezentis nian Ligon. *Brazilo Esperantisto* prezentas al la vivino kaj al D-ro Lauro Zamenhof Braga la kondolencon tiam manifestitan.

Brazilo Klubo Esperanto, de Rio de Janeiro, omaĝe al sia membro kaj iama estrarano dediĉis al Ismael Gomes Braga sian kunvenon de la 25-a de Januaro, en kiu li estis amike memorigita kaj en kiu oni legis kelkajn liajn laboraĵojn.

ADEMAR PEREIRA DE BARROS

D-ro Ademar Pereira de Barros, kiu estis dum multaj jaroj ŝtatestro de São Paulo, mortis en Parizo la 12-an de Marto.

Plurfoje li sin manifestis favora al la ideo de Internacia Lingvo. Laŭ propono de nia karmemora samideano Miguel Timponi li fariĝis Dumviva Membro de nia Movado. Per dekreto li kreis en São Paulo la Komunuman Kurson de E-o, kiu daŭris kelkajn jarojn kaj en kiun enskribiĝis 999 lernantoj.

CLARA ALVINA ZUHLKE JURUENA

En la 5-a de Januaro mortis S-ino Clara Alvina Zuhlke Juruena, konstanta membro de nia Ligo kaj oficistino de Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko. Kun entuziasmo ŝi partoprenis en kelkaj Brazilaj Kongresoj de Esperanto.

**PLENA GRAMATIKO DE
ESPERANTO**

I Vol. NCr\$ 18,00
II Vol. NCr\$ 22,50

Brazila Klubo Esperanto Bonvenigas Prelegantojn

Kun la celo ebligi al siaj membroj la uzadon de la Internacia Lingvo sur diversaj kampoj de la kultura kaj praktika vivo, Brazila Klubo Esperanto enkondukis novan eron en la programon de siaj tradiciaj sabataj kunvenoj: la prezentadon de prelegoj en Esperanto.

Post la ok unuaj prelegoj, oni ĝoje povas konstati la plenan sukceson de la entrepreno: en la malnovaj salonoj de la klubo jam aŭdiĝis sian voĉon prelegantoj de plej diversaj profesioj, okupoj kaj kulturaj niveloj; oni pritraktis temojn de scienco, literaturo, artoj kaj metioj, antaŭ atentoplena aŭskultantaro, kiu ofte partoprenis per komentarioj, demandoj, aplaŭdoj. Kaj Esperanto, kompreneble, ankoraŭfoje montriĝis bonega instrumento de komunikado inter oratoroj kaj publiko.

Al la amikoj de B.K.E. ni tutkore invitas partopreni la venontajn prelegojn.



Parto de la lernantoj ĉe Curso de Esperanto Bezerra de Menezes, Strato Saldanha Maranhão 189, Campos RJ. Gvidas la kurson nia fervora samideanino instruistino Maria Luísa Bilot.

KONKURSO

Brazila Esperantisto anoncis en la n-ro de Aprilo-Junio 1968 konkurson de traduko, kiu fermiĝis en la 31-a de Decembro.

La konkurso enhavis du partojn — prozo kaj poezio. Por la unua parto estis ricevita 6 tradukaĵoj sub jenaj pseŭdonimoj: Mardo, Simplulo, Ferdinando, Aso, Araguaia kaj Kosmopolito; kaj por la dua parto 3: Anga Katu, Araguaia kaj Kosmopolito.

La Juĝa Komisiono konsistis el Prof. Dro Carlos Domingues, Akademiano, Ing. Floriano Pessoa, sekretario de B.E.L. kaj Kol. Jorge Campos de Oliveira, bibliotekisto de B.E.L.

Post ekzameno de la verkaĵoj la Komisiono decidis klasigi jene la prozajn tradukaĵojn: 1-aj Kosmopolito kaj Aso, 2-a Simplulo, 3-a Araguaia; la poeziaj tradukaĵoj estis klasigitaj en la sekvan-

ta ordo: 1-a Kosmopolito, 2-a Anga Katu, 3-a Araguaia.

Malferminte la kovertojn, oni trovis, ke la venkintoj en la unua sekcio estas: 1-aj S-ro Benedicto Silva el Monte Aprazivel SP kaj S-ro Affonso Borges Gallego Soares el Rio de Janeiro; 2-a S-ro Danilo Carvalho Villela el Rio de Janeiro; 3-a S-ino Augusta Bougelet de Souza el Resende RJ. En la 2-a sekcio venkis: 1-a S-ro Benedicto Silva, 2-a "Anga Katu" (kiu ne deziras esti konigata), 3-a S-ino Augusta Bougelet de Souza.

Ĉiu venkinto ricevos premie libron.

Ĉar en la 1-a sekcio estis du premiitoj, la komisiono decidis publikiĝi la tradukaĵojn de S-ro A. B. Gallego Soares, konsiderante, ke S-ro B. Silva jam venkis en antaŭa konkurso kaj, ke tiam lia laboraĵo estis publikigita.

Rilate la duan sekcion ni aperigas la tradukaĵojn de S-ro B. Silva.

Sincere ni gratulas ĉiujn konkurantojn speciale la venkintojn.

LA KRONIKISTOJ

Medeiros e Albuquerque

Ekzistas personoj, kiuj afektas malŝati la kronikistojn. Ĉi tiuj — tekstas franca dirajo — estas *diseurs de rien*.

Sed tiu frazo enhavas profundan eraron, kaj kiu tion asertas, trompiĝas de la tono de kelkaj skribaĵoj.

Bona kronikisto iafaje esploras plej altajn ideojn de diversaj kategorioj. Li nur ne prenas tiun solenan kaj brustostreĉan teniĝon de tiuj homoj, kiuj por diri la plej trivialajn banalaĵojn, uzas pedantaĵojn esprimojn, kavazaŭ ili malkaŝas al gapantaj popoloj novajn, nekonatajn veraĵojn. Kronikisto, vere scianta sian oficon, faras ĝuste la kontraŭon.

Se aŭtentika atleto, kun potencaj bicepsoj, trovas survoje grandegan pezaĵon, li nature prenas ĝin, kvazaŭ li levus malpezan objekton, kaj, per simpla, eleganta movo, metas ĝin flanken. Falsa atleto preferos paradi sur estrado, elmontrante la levotan mason, por altiri kies atenton sur la bravegecon de sia faro. Poste li kliniĝos, kaj per kuntirita vizaĝo kaj streĉitaj muskoloj, li ŝajnigos herculesan penon. Ĉio ĉi estus ne-

DUALISMO

Olavo Bilac

Ne estas bona vi, kaj ne malbona:
Sed trista kaj nur homa... Koro via
Angoras per malben' kaj preĝo tia:
— Tumulta plendo de la mar' impona.

En bono kaj malbon', sufero ĉia
Vin trenas, povran, en frenez' demona,
Kaj inter kred' kaj elreĝiĝo sprona
Vi iras kun esper' aŭ apatia.

Kapabla je terur' kaj far' subluma,
La belaj virtoj ne ĝojigas vin,
Nek pentas vi pri via faro krima:

Pro l'ideal' premanta vin, jen tio:
Al vi kunloĝas en profund' de l'sin'
Demon' blekanta kaj ploranta dio.

Tradukis: Benedicto Silva

nio alia ol mistifiko, kaj vere, sub la ŝajno de grandega pezajo, ekzistus nenio pli ol malplenaj sferoj el ligno, kolorigitaj por aspekti kvazaŭ el fero.

Tradukis: Affonso Borges Gallego Soares.

Brazila Kroniko

BAHIA

Salvador — D-ro Luiz Rogério, prezidanto de la ŝtata Konsilantaro de Edukado, kune kun ĝiaj membroj D-ro Luiz Monteiro, D-ro Raimundo Mata kaj aliaj, vige penas enkonduki Esperanton en la mezgradajn lernejojn de la ŝtato kiel praktikan edukon lernobjekton. Tio estos nekontestebla unu plia venko por Esperanto. Kiel prezidanto de Bahia Esperanto-Asocio, S-ro Godofredo de Araujo Góes diligente sin okupas pri la afero.

Ilhéus — La radistacio "Radio Baiana de Ilheus" intervjuis en la 12-a de Decembro lasta en sia programo "Kun la Buŝo en la Mondo" nian samideanon. Eléus Leonardo de Sá, kiu tiam donis multajn informojn pri Esperanto. Fine li deklamis soneton kaj kantis la kanzonon "Sankta Lucio. La intervjuo tre plaĉis al la aŭskultantoj kaj S-ro Sá ricevis multajn gratulojn.

RIO DE JANEIRO

Campos — De la unua ĝis la 15-a de Aŭgusto de la pasinta jaro okazis Esperanta Ekspozicio en la kadro de la 2-a "Fescampi" (Festivalo de Campos pri Industriaĵoj Produktaj) sub la patroneco de "Câmara Junior de Campos". La loko de la ekspozicio estis Federacia Teknika Lernejo. Vizitis la ekspozicion proksimume 55.000 personoj. La materialo ekspoziciita konsistis el 50 libroj akiritaj ĉe B.E.L., afiŝoj, revuoj, turismaj kaj informaj prospektaj. Al la vizitantoj oni disdonis flugfoliojn eldonitajn de B.E.L.

Resende — La ĵurnalisto João Paraguassu aperigis en la ĵurnalo "Correio da Manhã" de Rio de Janeiro artikolon, en kiu li montriĝis ne plene informita pri la ideo de Esperanto. Tial nia samideanino S-ino Augusta M. J. Bougelet de Souza de Resende Esperanto Klubo, skribis al li leteron, en kiu ŝi trafis klarigas la dubajn punktojn

SÃO PAULO

Lins — En la 5-a de Januaro okazis la 2-a Esperantista Regiona Kunve-

no kunvokita de Bauru Esperanto-Asocio kaj de Esperantista Grupo de Lins. La laboroj realiĝis en la sidejo de "Fundação Gil Pimentel Moura"; partoprenis esperantistoj el urboj Bauru, Lins, Promissão, Guarantã, Cafelândia, Marília, São Paulo, Tupi Paulista kaj São Manoel, kaj ĉeestis 76 personoj. Prezidis la kunvenon D-ro Jacob Duarte, prezidanto de Bauru E. A. kaj paroladis jenaj personoj: S-ro Wilson Ferreira Martins pri la agado de la asocioj, S-ro Aylton Guido Coimbra Paiva pri la metodologio de la instruado de Esperanto, S-ro Otaviano de Castro Barra pri la Majstro Zamehof kaj S-ro Germano Braga pri la eminentaj verkistoj en Esperanto. La reprezentantoj de la diversaj urboj salutis la kunvenon. Oni elektis regionan komisionon por organizi la estontajn kunvenojn. La plej proksima okazos en Marília. En amuziga programo oni kantis esperantajn kanzonojn. Estis prezentita Esperanta Ekspozicio.

Ribeirão Preto — En la 19-a de Oktobro lasta estis akceptita en la sidejo de Ribeirão Preto Esperanto-Klubo la triboĉefo Ubiratan Kupira Eirê Lauapit, kiu estas la nuna estro de la 3.800 *Apurinans* loĝantaj ĉe la maldekstra bordo de la rivero Urariquerana en Teritorio Roraima. La triboĉefo, kiu jam vojaĝis tra pluraj landoj de Eŭropo kaj Ameriko, forte interesiĝas pri Esperanto, kiun li iom lernis kaj kies lernadon li deziras enkonduki en sian tribon. La prezidanto de R.P.E.K., Prof. Osvaldo Arruda Stein, donis al Ubiratan kaj al lia filo diplomon de honora membro.

— En la 14-a de Decembro lasta estis enoficigita la estraro de Ribeirão Preto Esperanto-Klubo por la jaro 1969, kiu konsistas el jenaj personoj: prez., S-ino Antonieta A. Miranda; vic-prez., S-ro Osvaldo A. Stein; ĝen. sekr., D-ro José de Freitas Ramos; 1-a sekr., S-ino Leda Silva F. Ramos; 2-a, S-ro Manoel M. Siscatti; kas., S-ro José Pedro Miranda; bibl. S-ino Nilza A. Fontes. Estis ankaŭ enoficigitaj la estroj de la departementoj Jura, Muzika, Junulara, Informa, Publikrilata, Kultura-Eduka kaj la Konsilantaro. Oni legis salutleteron de B.E.L.. La prezidantino prezentis sian programon, kaj paroladis D-ro José de Freitas Ramos, S-ro Valdir Pires kaj la delegito de U.E.A., S-ro José Pedro Miranda.

Sorocaba — La 15-an de Septembro lasta okazis en Sorocaba Esperanto-Klubo la 1-a Kulturkunveno kun partopreno de multaj esperantistoj inkluzive de karavano de São Paulo Esperanto-Asocio.

— En la radioprogramo ĉe “Rádio Clube de Sorocaba” inter aliaj eroj oni uzas la libron “Metodo Elementar de Esperanto” de Torres Pastorino por ekzerco de diktado.

PARANÁ

Curitiba — F-ino Maria Rosa De Angelis, delegitino de nia Movado en Potirendaba SP, vizitis en Marto la ĉefurbon de ŝtato Paraná, kie ŝi kontaktiĝis kun la lokaj samideanoj. Per la ŝtata Radio ŝi faris paroladeton pri Esperanto.

Londrina — En la 13-a kaj 14-a de Julio de la pasinta jaro okazis la 4-a Renkontiĝo de la esperantistoj de ŝtato Paraná, sub aŭspicioj de Paraná Esperanto-Asocio kaj de Instituto Londrinense de Esperanto. La interesa programo entenis interalie promenadojn tra la urbo kaj kunfratiĝan vespermanĝon en loka restoracio.

Paranavaí — Dum vizito de S-ro Gert Drucker, prezidanto de Paraná E. A., estis solene fondita la 16-an de Julio de la pasinta jaro Paranavaí Esperanto-Societo. La kunveno okazis en sciencoj-salono de Prof. Pedro Real; kaj estis elektita jena estraro: prez., Prof. Pedro Real; vicprez., S-ino Eunice N. Reis; 1-a sekr., S-ro Natal dos San-

tos; 2-a, S-ro Irineu C. Sorrilha; kas., S-ro Antonio G. Batistela; parol., S-ro Anibal E. da Silva; bibl., S-ro João C. Pedro Real; konsil. S-ino Maria Alice van der Broock Penteado kaj S-ro José Gomes da Silva.

RIO GRANDE DO SUL

Porto Alegre — Esperantista Societo de Porto Alegre elektis en la 13-a de Decembro lasta sian novan estraron, kies konsisto estas jena: prez. Prof. Ernani Dias Corrêa; vicprez., Supera Juĝisto Modesto Belmonte de Abreu; 1-a sekr., S-ro Ary Zamora; 2-a, S-ro Camilo D. de Castro Vergara; bibl., D-ro Alcides L. Cardia; kas., S-ro Germano Meinhardt.

— La ĵurnalo “Correio do Povo” publikigis longan interesan artikolon de nia samdeano S-ro Egon Breitenbach sub la titolo “Esperanto e Religiões” (Esperanto kaj Religioj).

Erechim — Nia samideano S-ro Delcy João Maloz, redaktisto ĉe ZYH'98 “Rádio Erechim”, uzas sian oficon por konstante diskonigi artikolojn kaj informojn pri Esperanto.

GOIÁS

Goiânia — S-ro Dilmar Ferreira instruas Esperanton en Gimnazio Emanuel kaj en aliaj lernejoj, kie li estas profesoro de matematiko. Li ankaŭ estas kursgvidanto en Milita Polico de la ŝtato. En “Lion's Clube” instruas D-ro Raul Conde al 5 lernantoj.

— En la 8-a de Decembro lasta estis elektita la nova estraro de Goiânia Es-



Prof. Pedro Real organizis en sia privata lernejo daŭran ekspozicion de esperantaĵoj precipe de korespondado el 27 landoj de 4 kontinentoj.

LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO

NOMEAÇÃO DE VICE-PRESIDENTE

Achando-se vago o cargo de vice-presidente por morte do Sr. Ismael Gomes Braga, o Presidente da Liga, de acordo com o art. 10, § 1.º, b, dos Estatutos, nomeou em 3 de Março para preencher a vaga, até a próxima eleição, o Sr. Gen. Geraldo Alberto Gomes de Pádua.

O nomeado aceitou a indicação e já entrou em exercício.

ASSEMBLÉIA GERAL ORDINÁRIA

A 26 de Abril de 1969 reuniu-se em Sessão Ordinária a Assembléia Geral da Liga Brasileira de Esperanto, convocada na forma dos Estatutos.

Presidiu a reunião o Presidente da Liga, Prof. Dr. Carlos Domingues. O Segundo-Secretário, Dr. Joel Vasques Manso, leu a ata da assembléia anterior e o Secretário-Geral, Dr. Luís Al-

berto Martins, o Relatório da Presidência referente ao exercício de 1968 e o Balanço apresentado pela Tesoureira, D. Irani Baggi de Araujo. Os três documentos, submetidos a discussão foram aprovados por unanimidade.

Na eleição para o cargo de vice-presidente, por proposta de D. Maria do Amaral Malheiro, foi aclamado o Gen. Geraldo Alberto Gomes de Pádua, que exercia o cargo interinamente.

O Cel. Jorge Campos de Oliveira propôs um voto de pesar pela morte dos consócios Luiz de Azeredo Coutinho, Ismael Gomes Braga e Clara Alvina Zuhlke Juruená; e o Dr. Floriano Pessoa, Primeiro-Secretário, um voto pelo restabelecimento dos consócios Antonio Caetano Coutinho e Irani Baggi de Araujo. Esses votos foram aprovados.

Estiveram representadas as seguintes instituições: Ceará E.A., G.E. de Limoeiro do Norte, A. Pernambucana de E., A. Baiana de E., S. Mineira de E., G. E. Juiz de Fora, Niterói E.K., Campos E.K., Brasília K.E., C.E. Santos, Paraná E.A., E.S. São Leopoldo e Goiânia E.K.

peranto-Klubo, kiu konsistas el jenaj anoj: patrono, S-ro Aloísio C. S. Melo; prez., D-ro Raul Conde; vicprez., Kolo-nelo D-ro Hosanah de Araujo Almeida; 1-a sekr., F-ino Marlene A. Gomes; 2-a F-ino Laura G. Rodrigues; 3-a, S-ino Joaquina R. Castro; 1-a kas. S-ro Francisco R. de Moraes Sob.; 2-a F-ino Eufêmia S. Ramos; dep. propagando, S-ro Nelcivone C. Melo; dep. junul., S-ro Dilmar Ferreira; konsil., D-roj Edson L. de Faria, Fausto R. Vale kaj José V. Sócrates; delegito ĉe B.E.L., D-ro Carlos Domingues.

— Sekve de ekzameno fariĝa en Goiânia E. K. ricevis la elementan diplomon de B.E.L. 15 lernintoj. La soleno okazis la 29-an de Marto en la festsalono de Federacia Teknika Lernejo. D-ro Raul Conde prezidis la ceremonion, kiun malfermis la muzikistaro de la Ŝtata Polico ludante la Nacian Himnon. Kiel patrono de la diplomitoj paroladis Prof. Aidenor Aires, kiu brile gratulis la novajn esperantistojn. Ankaŭ paroladis Kol. D-ro Hosanah de Araujo Almeida en la nomo de siaj kolegoj, la diplomitoj. Multinombraj invititoj kaj familioj de la diplomitoj plenigis la salonon.

54.º CONGRESSO INTERNACIONAL DE ESPERANTO

WAGONS-LITS-COOK

A conhecida agência de viagens *Wagons-Lits-Cook* escreveu à B.E.L. oferecendo seus serviços para a organização da viagem dos participantes deste país ao próximo Congresso Internacional em Helsinki. Com 120 anos de existência, o estabelecimento possui 420 agências e é conhecido em todo o mundo.

ELEKTITAJ PAROLADOJ KAJ PRELEGOJ

Discursos e preleções do famoso orador Prof. Dr. *Ivo Lapenna*, presidente da U.E.A. e membro da Academia de Esperanto. Magnífico material para documentação, informação e argumentação NCr\$ 19,80

JUNA ESPERANTISTO DIPLOMITA



Nia juna samideano Rosvaldo Moreira de Holanda, filo de nia samideano S-ro Osvaldo Pires de Holanda, el São Miguel Paulista SP, skribis al ni jenan leteron:

São Paulo, la 15-an de Oktobro 1968.

Sinjoro Prezidanto,

Mi konfirmas la ricevon de mia Norma Elementa Diploma, kio faris min tre ĝoja kaj tre feliĉa.

Estante unu el la plej junaj brazilaj esperantistoj (dekjaraĝa), mi estos tre danka, se vi kompleze diskonigos mian adreson per Brazila Esperantisto, ĉar mi deziras interŝanĝi poŝtkartojn kun gejunuloj de la tuta mondo.

Ĉi-kune mi sendas al vi mian foto-grafajon ankaŭ petante, ke vi publikigu ĝin.

M restas

samideane via
Rosvaldo

Mia adreso: — Rosvaldo Moreira de Holanda - Caixa Postal, 100 - São Miguel Paulista, SP., Brazilo.

PLENA VORTARO DE ESPERANTO

Formato pequeno NCr\$ 18,00
Formato maior NCr\$ 27,00

APERFEIĈOE O SEU CONHECIMENTO

Komparu vian tradukon kun la nia, kaj eltiru instruon per esploro de la diferencoj.

LA DUELO

João Guimarães Rosa

Turibio Todo ektremis, aŭdante firma kaj pli laŭta alian voĉon de la kamparulo, antaŭe neniam aŭditan.

— Kion? Kion? ... Ĉu vi frenezigiĝis?!...

Sed la malfortikulo estis serioza kaj pala, kaj lia dekstra mano tenis malnovan pistolon kun du paralelaj kaj timigaj tuboj.

— Deĉevaliĝu tuj, S-ro Turibio!...

Kaj la viraĉo tion diris molto- ne, sed kun minaca viglatento.

Tiam Turibio Todo, fikse rigardante lin, rektiĝis kaj laŭtigis la voĉon.

— Ĉesu tian mistifikon, hundo, aŭ mi vin distranĉos per la skurĝo!...

— Ne kriu, S-ro Turibio, ĉar ne utilas... Mi petas pardonon al Dio kaj al vi, sed estas senrimede; mi promesis al sambaptano Cassiano, tie en Mosquito, en la horo mem, kiam li fermis la okulojn...

Aŭdinte la nomon de sia malamiko, Turibio Todo pli forte malse- reniĝis. La mano de la kamparuleto, tenanta la pistolon, tremadis. Same Turibio iĝis tutkorpe tremanta.

— Ha, kiom li pagis al vi? Mi povas vin doni la duoblon; mi donos al vi ĉiom, kiom mi havas!...

— Ne estas rimedo, ne estas rimedo, S-ro Turibio... Post Dio estas li, kiu savis la vivon al mia in-

DELEGADOS NA AMÉRICA

Segundo o JARLIBRO da Associação Universal de Esperanto para 1969 há no mundo 3597 Delegados do Movimento Esperantista em 63 países.

Desses Delegados 444 acham-se na América, distribuídos da seguinte forma:

Brasil	192
Estados Unidos	184
Canadá	21
Uruguai	12
Argentina	11
México	11
Venezuela	5
Antilhas	3
Colômbia	2
Costa Rica	1
Cuba	1
Peru	1

Depreende-se do quadro que não há Delegados em mais da metade dos países americanos. Torna-se cada vez mais necessária a nossa cooperação, na medida do possível, para preencher a grave lacuna.

O Brasil está em primeiro lugar, mas isso não quer dizer que não devamos esforçar-nos por aumentar o número. No próximo ano superaremos sem dúvida as duas centenas.

Renovamos o nosso cordial convite para que todos os nossos consócios se apresentem, desde logo, candidatos. Teremos grande prazer em nomeá-los.

KATALOGO DE ELEKTITAJ LIBROJ EN ESPERANTO

Livro ilustrado, interessante para leitura e muito próprio para presente e propaganda.

Documento valioso para prova da vitalidade do Esperanto e de sua literatura NCr\$ 3,15

faneto... Kaj mi faris la promeson, kiam li jam tenis kandelon en la mano... Tre bedaŭrinde! Sed ne estas rimedo... neniu rimedo!...

Elportugaligis G.P.

PUBLIKA UTILECO

Per Leĝo n-ro 3.316, de la 18-a de Septembro 1968, la Urba Konsilantaro de Curitiba, ĉefurbo de ŝtato Paraná, konsideris Paraná Esperanto-Asocion kiel institucion de publika utileco. En la dekreto estas menciite, ke P.E.A. estas filiita al Brazila Esperanto-Ligo.

La leĝo rezultis de projekto prezentita de la urbkonsilantino S-ino Maria Clara Tesserolli, al kiu certe ĉiuj niaj legantoj volos skribi kun gratulo pro la favora agado al nia afero. (Adr.: Vereadora Sra. Maria Clara Tesserolli, Edifício da Câmara Municipal de Curitiba, Curitiba, Paraná).

Ni transskribas la oficialan tekston de la leĝo:

LEI N.º 3316

Data: 18 de setembro de 1968

Declara de utilidade pública a Associação Paranaense de Esperanto.

A Câmara Municipal de Curitiba, Capital do Estado do Paraná, decretou e eu, Prefeito Municipal, sanciono a seguinte lei:

Artigo 1.º — É o Poder Executivo autorizado a reconhecer como de utilidade pública a Associação Paranaense de Esperanto, filiada à Liga Brasileira de Esperanto.

Artigo 2.º — Esta Lei entrará em vigor na data de sua publicação, revogadas as disposições em contrário.

Paço da Liberdade, em 18 de setembro de 1968.

(a.) Omar Sabbag
Prefeito Municipal

(Diário Oficial — Estado do Paraná — Atos do Município de Curitiba — 28 de setembro de 1968)

PAGU FRUE VIAN KOTIZON